

AMERIKA ESPERANTISTO




AMERICAN ESPERANTO MAGAZINE

LA
ESPERANTO
MOVADO

•
*Kritika
Esploro
pri
Danĝera
Tendenco*

1

1960



BENJAMIN FRANKLIN

*"Se ĉiuj presistoj decidus ne presi
ton ĝis ili estus certaj, ke tio ofendus
neniun, tre malmulte estus presita."*

AMERICAN ESPERANTO MAGAZINE

Official publication of the
ESPERANTO ASSOCIATION OF NORTH AMERICA, Inc.
114 West 16 St., New York 11, N. Y.

Central Office: Doris T. Connor, George Alan Connor, Myron R. Mychajliw

KOMUNISTA ENFILTRADO EN LA ESPERANTO-MOVADON

Ni, en la Centra Oficejo, tradukis la sekvantan artikolon el la ne-Esperantista gazeto "Bulletin des NIZ", Gutenbergstr. 13, St. Gallen, Svislando. Ĝi aperis germanlingve en serio de aprilo 1958 ĝis julio 1959. Ni publikigas la tradukon sen ŝanĝoj, inkluzive la titolon kaj subtitolojn. Interese estas, ke jam antaŭ dek jaroj (marto 1950), interne de nia movado (eĉ antaŭ ol ekzistis tiom da komunistaj Esperanto-gazetoj), Oskar Svantesson, tiama redaktoro de "La Espero", organo de la sveda landa asocio, komentis jene: "Ĉu neŭtrala? – La tendencaj gazetoj en nia movado, kiuj uzas Esperanton, plejparte apartenas al tre maldekstraflankaj tendencoj. Ne povas esti bona neŭtraleco, lasi la vojon libera al unu tendenco kaj esti devigata pro neŭtraleco resti silenta, dum ne estas kontraŭpezo en la alia flanko. . . . La komunismo en multaj landoj ne estas tre ŝatata ideologio, kaj multfoje la Esperantisto renkontas la falsan opinion, ke Esperanto kaj komunismo estas proksimume egalaj aferoj." Estas certe, ke Esperanto (kiel lingvo) ne estas komunista, sed ĉu niaj Esperanto-organizoj kaj gazetoj (pro iu "Ismo") montras kreskantan komunistan influon? Ĉar ni opinias, ke ĉiuj Esperantistoj devus funde esplori la problemon, ni presas ĉi tiun analizon.

"The Association will not knowingly admit as members persons who are Communists or Fascists or others who seek to overthrow the Government of, or in the interests of a foreign power seek to weaken, the United States, or to change its form of government by other than constitutional means." – EANA Constitution.

Subscriptions in the United States and Canada: \$3.00 per year.
Jarabono eksterlande por kalendara jaro: \$1.50 aŭ egalvaloro.
Gratis to Members of the EANA.

Regular Membership in EANA – \$5.00 per year. Patron – \$10.00.
H. S. or College Student & Armed Forces – \$3.00 per year.
Sustaining Board – \$3.00 or more per month.

AMERIKA ESPERANTISTO

Vol. 73

FEBRUARO 1960

N-ro 1

KOMUNISTA ENFILTRADO EN LA ESPERANTO-MOVADON

Tradukita el "Bulletin des Nationalen Informations-Zentrums"

Per rafinita kaj cinike maskita taktiko, la komunistoj scias kiel sukcese uzi por siaj mond-konkeraj planoj la sopiron de la popoloj por la paco kaj ilian abomenon kontraŭ la milito. La organizantoj de la kampanjoj por "paco kaj kunekzisto" kun speciala ŝato utiligas por tiu celo diversajn movadojn kaj organizojn, laborantajn por internacia amikeco, interkompreno, kultur-interŝanĝo, por daŭra paco, ktp. Al ĉiu gazetleganto estas konata, almenaŭ laŭnome, aro da tiaj organizoj. La granda parto el ili estas freŝdataj, t.e. fonditaj nur post la Dua Mondmilito, fonditaj de komunistoj speciale por la "pac-milito". Sed kelkaj el ili havas jam respektindan aĝon kaj ilia celo de fondiĝo estis, se ne kontraŭkomunista, almenaŭ nekomunista. Por ili, internacia paco por kiu ili pledas signifas vere pacon, eĉ se ilia mondfratiga idealo, kiu ilin inspiras, havas tre utopian aspekton, kaj kun sia naŭva kredo je progreso ili postrestas ankoraŭ en la 19-a jarcento.

Idealistoj Taŭgas Plej Bone

Tiu sincera deziro al la paco kompreneble ne malhelpas al komunistoj ennestiĝi en tiuj organizoj, profiti de iliaj nesuspektataj nomoj, kaj senhonte meti ilian agadon por la paco je la servo de la komunista ofensivo. Kaj la bonkoruloj por sia pura idealismo eĉ ne rimarkas kio okazas. Ĉiu tia organizo, nova aŭ malnova, per si mem estas nur "sensignifa fragmento", sed lerte kunordigita agado de multaj tiaj fragmentoj povas havigi al la komunistaj partioj, do al la rusaj kvinaj kolonoj, gravajn servojn. Tial valoras la penon teni sub observo ĉiun tian organizon.

Favoro kaj Malfavoro Alternas

Unu el la supre menciitaj movadoj de pli malnova dato estas la movado por disvastigo de la internacia lingvo Esperanto. En 1957 ĝi povis celebri sian 70-jaran jubileon. Ĉi tie ne estas loko okupiĝi pri tio, kiel evoluis la movado, kiajn malsukcesojn kaj progresojn ĝi travivis, nek estas loko listigi la organizojn, gazetojn, internaciajn kongresojn (tiu de 1959 estis en Varsovio, Pollando), librojn en Esperanto, radio-staciojn kiuj dissendas en Esperanto, ktp. Ni menciuj nur la sekvantajn punktojn de la evoluo, ĉar ili havas rektan rilaton al la temo de ĉi tiu artikolo.

Antaŭ la Unua Mondmilito ekzistis en Rusujo multaj Esperantistoj, (inter aliaj Leo Tolstoj). En la komenca periodo de la bolŝevismo Esperanto havis eĉ ŝtatan apogon. Rusujo estis la unua lando, kiu eldonis poŝtmarkojn kun Esperanto-teksto. Kiam komenciĝis la grandaj "purigoj" meze de la tridekaj jaroj, kaj la fera kurteno hermetike fermiĝis, ĉiu ebleco de kontakto kun Esperantistoj en Rusujo subite ĉesis. Ĝis la mortode Stalin oni nenion plu aŭdis pri Esperanto aŭ Esperantistoj en Sovetio. Oni ne scias ĉu ĝi estis oficiale malpermesita, aŭ laŭ bone konata metodo, malvarme likvidita. Proksimume en la sama tempo la "brunaj komunistoj" en Germanujo malpermesis ĝin, kaj ĝis la jaro 1945 persekutis ĝin en la okupitaj landoj.

Ankaŭ en la landoj okupitaj de la komunistoj post la Dua Mondmilito, Esperanto ne estis favorata, (en kelkaj el ili, ekz. en Ĉekoslovakujo, ekzistis tre forta movado). Oni simple nenion plu aŭdis pri ĝi kaj ne ekzistis ia ebleco starigi kontaktojn. Ĉu kaj kie ĝi estis malpermesita, subpremita aŭ nur tolerita, oni ne scias. Unuan ŝanĝon en sia sinteno, sed nur *ekster*

Sovetio kaj la okupitaj landoj, la komunistoj montris en Stokholmo (1950), kiam ili komencis denove ludi komedion pri kontraŭmilitismo kaj mondpaĉo. Sub la masko de la Mondpaĉa Konsilantaro ili subite denove ekinteresiĝis plej varme pri Esperanto kaj komencis meti la movadon je la servo de la "paĉo". Kun kiom da sukceso, ni montros poste.

Esperanto kiel Lingvo de Kunezisto

Interne de la komunista imperio la vento ŝanĝiĝis kun la komenciĝo de la "epoko de kunezisto" post la morto de Stalin. Preskaŭ de unu tago al la alia en diversaj rusaj kolonioj (kiel Bulgarujo, Hungarujo, Pollando) komencis aperadi komunista propaganda literaturo por paĉo kaj kunezisto, kontraŭ imperialismo kaj atomeksperimentoj, per kiuj oni superŝutis kaj ankoraŭ superŝutas Esperantistojn "je la alia flanko". Konante bone la navian pacifistan pensadon de la plimulto de la Esperantistoj, la komunistoj anticipis ke tiu literaturo falos sur fekundan grundon. Mi montros poste, ke ili ĝuste orientiĝis.

El la evoluo de la movado en la nekomunista parto de la mondo, mi volas mencii per kelkaj vortoj nur pri du okazintaĵoj freŝdataj. UNESCO en sia 8-a ĝenerala kunveno en 1954 en Montevideo okupiĝis pri Esperanto. Ĝi ĝuste dirite rajtigis sian ĝeneralan sekretarion observi la spertojn, kiuj estas farataj per la uzado de Esperanto en la kampoj de edukado, scienco kaj kulturo, kaj kunlabori je tiu celo kun la Universala Esperanto-Asocio en demandoj, kiuj interesas ambaŭ organizojn. (Sobraj Esperantistoj kompreneble ne faras al si iluziojn pri la valoro de tiu rekono.) La 36-a Internacia Eŭkaristia Mondkongreso en 1955 en Rio de Janeiro uzis Esperanton oficiale kiel unu el la kongres-lingvoj. Okazis diservoj en Esperanto kaj entiu lingvo estis faritaj predikoj. La internacia katolika Esperanto-movado eldonis ampleksan kaj tre interesan memorlibron pri la Kongreso. Ĉi tiu fakto sufiĉu por montri, ke ekzistas diversspecaj Esperantistoj, kiujn oni neniel rajtas ĵeti en la saman poton.

Por klarigi kial komunistoj ĝuste sciis, ke valoros malŝpari paperon kaj inkon agante ankaŭ en ĉi tiu lingvo de malgranda rondo por la "paĉo", estas necese prezenti la movadon de la ideologia flanko.

Ke Esperanto sukcese kontraŭstaris al multaj konkurencaj projektoj, ĝi dankas tion ne al siaj bonaj lingvaj kvalitoj, sed al *Esperantismo*.

La kreinto de Esperanto, la pola kuracisto *D-ro Zamenhof*, kiel vera filo de sia jarcento (1887) kredis je progreso. Li kredis al iluzio, ke la progreso de scienco kaj ĝenerala disvastiĝo de eduko garantios ĉiam pli kaj pli harmonian kunvivadon de la popoloj, kaj fine la eternan paĉon. Li kredis, ke per sia mondhelpingvo li povos krei bazon por daŭra interpaciĝo de popoloj, ĉar laŭ lia opinio la lingvo estas la plej grava portanto de komuna sento kaj aspiro de popolo, kaj pro tio ĉiuj malamikecoj devenas unuavice de malsameco de lingvoj. De kie alie do devus veni malpaĉo? La homoj laŭ sia naturo ja estas bonaj!

Por tiu idealo Zamenhof oferis sian tutan vivon kaj eltenis multajn suferojn. Li estis konvinkita, ke se oni donus al la homoj, krom ilia gepatra lingvo, unu komunan pont-lingvon (pro diversaj kialoj nur artefaritan, ne iun nacian lingvon), tiam la homoj sin interkomprenos, kreiĝos unu harmonia homa familio kaj ne plu okazos militoj. Por tiu idealo entuziasmiĝis liaj unuaj disĉiploj, kaj liaj ideoj fariĝis por ili dogmoj. Tutsame kiel ili, pensas ankoraŭ hodiaŭ la plimulto de la Esperantistoj. Kvankam la kreinto rezignis pri ĉiuj aŭtorrajtoj kaj solene deklaris, ke Esperanto ne povas esti ies propraĵo, kaj ke ĉiu estas libera uzi ĝin por sia laŭplaĉa celo, tamen li volis ke lia *idealo* estu ĉiam kunligita kun la lingvo. La lingvo ne devas esti celo por si mem, sed nur la rimedo por la celo. Paradokson en tio li ŝajne ne vidis, kaj ankaŭ la Esperantistoj ŝajne ĝin ne rimarkis aŭ ne volis vidi.

La Mito de la "Ismo"

Ĉiam en propagand-skribaĵoj por Esperanto kaj en Esperanto-gazetoj svarmas vortoj pri "paco", "popolinterkompreniĝo", "internacia harmonio", ktp. Tio estas propagando unuavice por la "Ismo" kaj nur duavice por la lingvo. (Jam en fruaj tempoj troviĝis unuopaj "herezuloj", kiuj interesigis nur pri la gramatiko, la vortaro, kaj pri la ebleco de praktika aplikado de la lingvo, kaj kiuj permesis al si trakti la "Ismon" kiel iomete ridindan naivaĵon. Kun la kresko de la movado kaj pligrandiĝo de la uzebleco de la lingvo, multiĝas ankaŭ, precipe inter la pli junaj Esperantistoj, la nombro de tiuj renegatoj kaj malinduloj, kiel ili estas konsiderataj de konservativuloj kaj ortodoksuloj.) Neskuebla konscio pri sia misio, duonreligia sektaneco, filozofia diletantismo, zelota fervoro, naiva mistikismo kaj troigita kulto pri la personeco de la fondinto kiel "apostolo de paco", jen estas tipaj distingiloj de la movado por Esperantismo.

Esperantismo en Komunista Perspektivo

Se ne ekzistus daŭra minaco por la libera mondo de konkermilito flanke de komunista Rusujo, kies lasta fazo nuntempe estas subfoso kaj moligo de la Okcidento per komunista pac- kaj kunekest-teatraĵo nun prezentata, la Esperantismo tute ne estus inda de tia konsidero. Sed hodiaŭ ĝi ludas fatalan rolon fariĝinte kaŝloko por komunista enfiltrado.

Ĉu estas pli taŭgaj ideoj, kiujn oni povus meti en la servon de la komunista fia packomedio? Apenaŭ! Ne estas do mirinde, ke kiam komunistoj, serĉante en malamika tendaro "pac-infektiĝemajn" lokojn, krom al multaj aliaj idealistaj movadoj, ankaŭ al Esperantistoj ili turnis sian atenton kaj ekiris al ĉasado de stultuloj en tiu kampo.

Ne estas tro mirige, ke Esperantistoj kun sia preteco trompiĝi per frazoj pri mondfratiĝo (ne gravas de kiu tiuj frazoj venas), trompiĝis ankaŭ pri ĉi tiuj. Ĉar se iu estas konvinkita, ke la paco estos garantiita se ĉiuj povos paroli unu kun la alia, kaj se iu estas surda al la kontraŭargumento, ke se tiel estus, ne devas esti disputoj inter germanlingvaj svisoj, tiu ankaŭ estas preta ĉirkaŭbraki ĉiun, sur kies lipoj estas la vorto "paco".

Granda Konfuzo de Mensoj

Kiam la komunistoj komencis denove permesi Esperanton, tio faris grandan konfuzon de mensoj. Jam la restarigo mem sufiĉus kiel sensacio, sed nun ili krom tio proklamis la saman idealon. Unuflanke tio vekis scivolemon kiel pritaksi tiun fenomenon, kion ĝi signifas, kian sintenon oni devas preni al tio. Aliflanke estis agrabla surprizo; oni sentis kontenton, atribuis al tiu komunista ŝanĝo ne nur grandan signifon por la lingvo kaj la "Ismo", sed antaŭflaris la grandan "ŝanĝon" entute.

Vera ŝanĝo, eĉ se nur rilate al Esperanto, havus por la lingvo grandan signifon. Se la rusoj akcelus Esperanton el praktikaj konsideroj, por ne plu perdi tempon por traduklaboroj en rilatoj kun siaj kolonioj, la cetera mondo ankaŭ estus montrinta pli da atento al tiu tempo-ŝpara rimedo. Sed pri tio ne ekzistas iu ajn indiko! La aliancanoj devas nun kiel antaŭe lerni ruse aŭ utiligi tradukistojn kiuj ellernis la rusan lingvon. Por ili temis ja pri praktika apliko, sed en tute alia senco! Esperanto mem interesas ilin neniam; ili interesigas nur pri Esperantistoj, kiujn oni povas atingi per ĉi tiu lingvo.

Je la momento, kiam Esperantistoj komencis rompi al si la kapojn pri la signifo de la "ŝanĝo", aŭ konsideri la ŝajne novan sintenon serioza, praktike ili jam perdis la ludon kun la komunistoj. Ili preterlasis la plej simplan rezonadon: ke la komunistoj denove eniris la aferon, tio ankoraŭ ne estas kialo rigardi ilin per amikaj okuloj; same kiel ne estas kialo por germanlingvano esti al ili amika *pro tio*, ke ili uzas la germanan lingvon. Aliflanke tute nature ne ekzistas iu ajn bazo tuj suspekti pri komunistaj inklinoj ĉiun, kiu lernas Esperanton, ĉar tiam laŭkonsekvence oni devus

same suspekti ĉiun german-parolanton pro tio, ke li parolas la saman lingvon kiun parolas Ulbricht.

Fari ion kontraŭ tio, ke la komunistoj uzas Esperanton, Esperantistoj memkompreneble ne povas, eĉ se ili ĉiuj estus kontraŭkomunistoj kaj tiu nova kresko estus por ili plej malagraba. Sed ja tute ne temas kaj ne temas pri tio, ke oni faru ion kontraŭ tiu uzo, sed ke oni prenu ĝustan sintenon al la nova situacio. Ankaŭ oni ne povas malhelpi, ke evidente komunistaj organizoj uzu Esperanton. Kiam ĝis nun ni parolis pri "la Esperantistoj", tio ne estis aludo pri ĉiuj membroj de la oficiala neŭtrala organizo. Ekzistas tre klarvida malplimulto, kiu ne kaptiĝis per la komunista pac-bluf.

Tio, kion komunistoj ĝis nun atingis estas klasika "Veni, vidi, vici". Kiamaniere ili agas por venki montriĝos en la sekvontaj klarigoj.

Esperanto estas en 95% de sia uziĝo skribata kaj tial legata lingvo. Ĝi estas *parolata* nur dum la ĉiujara internacia kongreso, kelkaj pli malgrandaj kunvenoj, kiel ankaŭ inter malmultaj Esperantistoj, kiam ili renkontas samideanojn dum siaj vojaĝoj en eksterlando. La legado de la plej gravaj Esperanto-gazetoj donas precizan bildon de la movado. El tiuj oni devas unuavice mencii la gazeton "Esperanto", la organo de UEA (Universala Esperanto-Asocio), kiu aperas monate en Rotterdam, sidejo de UEA. UEA estas internacia "tegment"-organizo, al kiu apartenas landaj asocioj, ankaŭ la svisa, kiel ankaŭ unuopaj membroj en landoj, en kiuj ankoraŭ ne ekzistas landa asocio. Ĝi havas proksimume 30,000 membrojn, kaj estas politike kaj religie severe neŭtrala, kiel ankaŭ estas la aliĝintaj landaj asocioj. Kiel prezidanto estas *Profesoro D-ro G. Canuto*, Torino, kiel ĝenerala sekretario estas *Profesoro D-ro Ivo Lapenna*, Wembley, Anglujo.

Pridisputita Ĝenerala Sekretario

Ĉirkaŭ la persono de *D-ro Lapenna*, depost certa tempo furiozas akra batalo, inter unuflanke la landa asocio de Ameriko (Usono) kaj aliflanke preskaŭ la tuta UEA. D-ro Lapenna antaŭ sia elektigo kiel ĝenerala sekretario de UEA, estis profesoro ĉe universitato en Zagrebo, Jugoslavio. El la artikoloj, kiuj aperas por lia defendo ĉefe en "Esperanto", en la "Jarlibro" de la organizo, kaj en "Heroldo" (unu el la plej gravaj Esperanto-publikaĵoj krom "Esperanto"), oni povas nerekte konkludi kiaj estas tiuj atakoj direktitaj kontraŭ li de la amerika landa asocio. Oni povas tie legi, ke esti komunisto ne estas malhelpo por doni al iu la oficon de ĝenerala sekretario, (ke Lapenna estas komunisto oni ne neis).

Longe kaj larĝe oni klarigas, ke en la Esperanto-movado, kiel severe neŭtrala organizo religie kaj politike, oni neniam demandis pri religia aŭ politika aparteneco. Oni ne volas enkonduki "McCarthy'ismon". Esperantismo postulas antaŭ ĉio neŭtralecon. La tuta Komitato de UEA atestas, ke en centoj da leteroj interŝanĝitaj kun Lapenna neniu trovis eĉ iun aludon, kiu estus en intereso de politika partio. (Kvazaŭ komunistoj ne scipovus labori sen mencio de la vorto komunisto!) Lapenna fine deklaras, ke li estas fiera pri tio, ke li estis jugoslava partizano (flanko de Tito!).

Du Pridisputitaj Voĉdonoj

Plue estas rebatita la "kalumnio", ke la elekto de Lapenna kiel ĝenerala sekretario efektiviĝis nur dank' al ruzo, ĉar sub lia gvido oni kun suspektinda rapideco trapuŝis voĉdonadon pri nova statuto, por ke oni akceptu malgrandajn asociojn kiel memstarajn asociojn, por povi dispartigi la jugoslavanan landan asocion en kvin sendependajn "landajn asociojn", kaj tiel fabriki kvar pliajn voĉojn por Lapenna. (La dispartigo okazis laŭ kvin asocioj: Jugoslavio, Serbio, Kroatio, Slovenio, kaj Bosnio.) Estis rebatita ankaŭ la "kalumnio", ke Lapenna diktatore postulas, ke ĉiu respektu lian — ofte por-komunistan — influon.

Fine oni deklaris, ke ĉio estas en ordo, kiam la sekretario de la amerika

landa asocio, kiu ĉefe komencis la kampanjon, estas mem eksigita el UEA kaj kun li la tuta landa asocio de Usono, ĉar ĝi ne sekvis la ordonon de la Komitato forturniĝi de "malpacigulo" kaj kuniĝi kun la intertempe nove fondita alia amerika asocio, kiu estas simpatia al la Komitato. (En la voĉdonado de la Komitato pri eksigo de la usona landa asocio voĉdonis 22 por, 6 kontraŭ, kaj 5 sin detenis. La protokolo de ĉi tiu voĉdonado finiĝas per deklaro: "La Estraro de UEA en sia laboro por Esperanto kaj la organizo, severe observis principon de neŭtraleco rilate al nacieco, raso, religio, politiko kaj sociaj problemoj..., esprimas al la ĝenerala sekretario sian solidarecon kun li.")

Riproĉoj Ne Estas Senbazaj

Kiu legas la gazeton "Esperanto", kaj aliajn Esperanto-gazetojn, devas veni al la konvinko, ke la faritaj riproĉoj, milde dirite, ne estas nur kaptitaj el aero. Estas ja klare, ke la influo de la ĝenerala sekretario de la organizo fariĝas rimarkebla en ties organo. Ĉu tion oni atribuu al influo de Lapenna, aŭ al la "Ismo", ĉiuokaze la tuta vico da faktoj montras, ke "io putras en Danlando":

– la ĉiam pli kaj pli da spaco okupita per entuziasma raportado pri la progreso de Esperanto en komunistaj landoj (inkluzive Sovetio);

– la subteno de ĉiuspekaj alvokoj por la paco kaj kontraŭ la atombombo;

– la treege favora recenzado pri Esperanto-gazetoj, kiuj aperas en komunistaj landoj (precipe "Nuntempa Bulgario" kaj "El Popola Ĉinio"), kiuj sin nomas politike neŭtralaj, kvankam ili malkaŝe kaj grandskale faras komunistan propagandon; kaj oni instigas al abonado de tiuj gazetoj;

– en la jaroj 1956/57 la disvastigita propagando por la Junular-Festivalo en Moskvo 1957, kaj fine

– la fakto, ke persiste oni preterlasas publikigi, kiel kontraŭpezon, okcidentajn ne-komunistajn ideojn, kiuj estas malkomfortaj "al la aliaj".

Neŭtralismo

Sed ŝajnas, ke Lapenna kaj la komitato, kiu staras malantaŭ li, povis kaj povas kalkuli je la subteno de la tre granda plimulto de la Esperantistoj. Okazis ja eksigoj kiel protesto kontraŭ la elekto de la ĝenerala sekretario, kontraŭ la eksigo de la ĝisnuna amerika landa asocio kaj starigo de servema kontraŭ-asocio, kontraŭ la fia ĵonglado per la ideoj de "paco" kaj "neŭtraleco", por kio la komunistaj gvidantaro lerte uzas utopiistan Esperantismon. (Ekz. ekzistis la landa asocio de Kubo. Plue, proksimume tridek eminentaj Esperantistoj subskribis deklaron, en kiu ili protestis kontraŭ eksigo de la usona landa asocio, kaj alvokis Esperantistojn ne partopreni en bojkoto.) Sed oni ne povis kaj ne povas rimarki iun pasian partoprenon en la konflikto, iun ekscitiĝon, aŭ entute iun protest-demonstracion.

La sinteno kaj entreprenitaj paŝoj de la ĝenerala sekretario estis akceptitaj senkritike, senhezite kaj sendiskute. Oni trovas ĉion en la plej bona ordo. Oni restas fidela al la alta idealo de Esperantismo, oni estas por la paco kaj por tiuj, kiuj estas ankaŭ por la paco, kaj oni nomas tion "absolute neŭtrala". Ankaŭ tiuj, al kiuj la tuta afero ne aspektas tute normala kaj kiuj estas konvinkitaj, ke la opozicion komencis ne nur unu persono, kaj kiuj ja ŝatus vidi sur la posteno de ĝenerala sekretario prefere alian personon, ankaŭ ili kredas kiel veraj Esperantistoj, ke ili ne rajtas entrepreni ion ajn, por ke ili ne peku kontraŭ "severa neŭtraleco".

... Anstataŭ Neŭtraleco

(NOTO: Dek kvin linioj pri Svislando kaj uzo de Esperanto ĉe svisa radio kaj kastelo Münchenwiler estas forlasitaj ĉi tie por ŝpari spacon.)

La aktivaj membroj inter la svisaj Esperantistoj estas informitaj pri la konflikto pro la ĝenerala sekretario kaj pri la kreskanta komunistaj tendenco de la abonataj publikaĵoj. Sed tio ne ĝenas ilin. Ne montrigas emoj esplori pri kio vere temas. Oni estas Esperantisto, do laŭtradicie oni de-

vas esti neŭtrala. Tio devus admoni ilin enrigardi la aferon, eĉ duoble. Ĉar se *iu* nacio devas scii kio estas neŭtraleco, kaj ke la ŝtata maksimumo ne povas liberigi la civitanon de la devo sin deteni de ia ajn kunlaboro kaj entiro de la troja ĉevalo, tiu nacio estas Svislando.

Mi menciis kvin faktojn, kiuj donas bazon por faritaj riproĉoj. Kelkaj citaĵoj el la du plej gravaj Esperanto-gazetoj "*Esperanto*" kaj "*Heroldo*" (la lasta ne estas organo de iu organizo, sed privata entrepreno), kaj kelkaj pli malgrandaj "neŭtralaj" gazetoj, permesos al la leganto mem krei al si propran opinion. (Mi intence preterlasas gazetojn, kiuj sekvas certan religian aŭ politikan linion.)

Se ni markus per *ruĝa* koloro ĉiujn artikolojn, kiuj rekte kaj malkaŝe venas el la komunista fonto, kaj tiujn, kiuj ja havas "neŭtralan" aŭtoron, sed ĉe komunista flanko estas akceptataj volonte kaj kun aprobo; poste per la *verda* koloro tiujn, kiuj enhavas eŭropajn ideojn kaj tiujn, kiuj elvokus ĉe komunistoj malŝaton; kaj fine, per la *blanka* koloro senpolitikan parton, artikolojn pri gramatikaj demandoj, vortaro, tekniko, pri konkurencaj projektoj, diskutoj pri membro-kotizoj, ktp; tiam la pli granda parto restus blanka, la ruĝa krajono estus aplikata tre ofte, kaj la verda nur tre malmulte.

Kelkaj citaĵoj unue el "*Esperanto*" ilustru tion: En la *Oktobra Numero 1956* aperis *alvoko* de la Leningrada Junularo "*al ĉiuj junular-grupoj, al ĉiuj junuloj kaj junulinoj, kiuj partoprenos en la Tutmonda Junular-Festivalo en Moskvo en 1957,*" ke ili jam nun kontaktiĝu kun Leningradanoj, por ke ĉe renkontiĝo en Moskvo oni povu saluti sin kiel bonaj konatoj.

En la *Maria Numero 1957* sur la *Junulara Paĝo* (en ĉiu numero estas rezervita almenaŭ unu paĝo por la junularo) denove oni parolas pri la Festivalo. Ĉiuj Esperantistoj estis petataj detale informi pri Esperanto al la personoj, pri kiuj oni scias, ke ili iras al Moskvo, kaj atentigi ilin pri renkontiĝo kun Esperantistoj dum la Festivalo. Kun emfazo estas ankaŭ menciite, ke la festivala himno estas tradukita en Esperanton.

Aprilo 1957. "Norda Vietnamo, Hanoi, Jan. 29. — Antaŭ nelonge fondiĝis la Vietnam Pacifista Esperanto-Asocio en Hanoi, laŭ sciigo de lokaj gazetoj. Ĝi estas membro de la Monda Esperanto-Movado por la Paco kaj de la Vietnam Pac-Komitato."

Aprilo 1957. Sur la *Junulara Paĝo* estas denove granda bruo pro la intereso, kiun ĉiuj preparkomitatoj montras por Esperanto. Ĉiuj Esperantistoj estas invitataj peti la redakcion de la gazeto "*Festival*", ke almenaŭ unu numero aperu en Esperanto.

Januaro 1958. Sur la *Junulara Paĝo* aperas kelkaj rimarkoj de la gvidanto de la kvar-persona *oficiala* delegacio de la Esperanto-Junularo al la Festivalo. Li skribas, ke ne sole la rusaj Esperantistoj estas kulpaj, se ne ĉio bone funkciis. "*Pli ĝuste estas kulpigi la ne-sovetiajn Esperantistojn, ke ili ne sufiĉe interesiĝis pri la Festivalo. Kelkaj eĉ havis negativan sintenon (!) pro argumentoj ne kongruantaj kun la inteligenta neŭtraleco, kiu devas regi en nia Movado.*" Tio estas skribita en *politike rigore neŭtrala gazeto*, krom tio eĉ sur la *junulara paĝo*.

De tempo al tempo aperas en "*Esperanto*" anoncoj (kvaronpaĝaj) por la ne-Esperantista studenta gazeto "*World Student News*" aperanta en Prago. Tiu gazeto aperas en la lingvoj angla, araba, franca, germana, hispana, itala, norvega, kaj rusa. Tio frapas rekte kontraŭ la principo fari reklamon nur pri verkoj en Esperanto. Ŝajnas, ke ĉi tie oni faras escepton, eble pro tio, ke la gazeto aperas en Prago. En la januara numero 1958 aperas sur la *junulara paĝo* artikolo pri ĉi tiu gazeto. Oni povas legi, ke en ĝi depost nelonge aperas ankaŭ Esperanto-kurso, kaj la Esperante parolantaj studentoj de la tuta mondo estas invitataj montri pli da intereso por tiu gazeto. Tuj apude oni povas legi sub *Budapesto*, ke tie aperas, ankaŭ en pluraj lingvoj, la fratrevuo de la "*World Student News*", nome "*Junularo de la*

Mondo", kiu estas dediĉita al la ne-studenta junularo. En la hungarlingva eldono de ĉi tiu oni presas ankaŭ Esperanto-kurson.

Februaro 1958. Sur la titolpaĝo estas reproduktita afiŝo de la internacia Foto-Ekspozicio en Budapeŝto. En la sama numero (p. 32) estas informo, ke oni uzas nun ankaŭ Esperanton ĉe organizado de la Internacia Lerneja Sportkonkurso, kiu okazas dum la Internacia Tago de la Infano (1-an de junio). La Esperante parolantaj instruistoj anoncu sin al la instruisto de gimnastiko en la mezlernejo *Klement Gottwald*... adreso... Ĉeĥoslovakujo. La alvokon, ĉetere, verkis iu s-ro Hill el Anglujo. En la sama numero: *Alvoko al la Jurnalistoj*. Funkcias denove la Tutmonda Esperantista Ĵurnalista Asocio. Prezidanto estas s-ro Thormodsen el Norvegujo. La kotizojn aŭ abonojn por la bulteno de la asocio oni sendu al s-ro Keremidciev, Sofio, Bulgarujo, aŭ al s-ro Ribot, Marmande, Francujo.

Marto 1958. Sub mallongaj novaĵoj: *"Juna Esperantistino el Norvegujo lastatempe pasigis semajnon en Germana Demokrata Respubliko, kie, inter alie ŝi montris belan kolorfilmon 'Bonvenon al Oslo', aŝable disponitan de Norvega Esperanto-Societo, kaj renkontis la estron de la distrikta packonsilantaro de Dresdno, kiu interesiĝas pri la Esperanto-laboro. La Esperantistoj en Orienta Germanujo volonte bonvenigos aliajn amikojn el la 'okcidento'."* (La vorto Okcidento estas metita en citsigno.)

En la sama numero: *Esperanto-movado en Litova SSR.* Raporto pri la unua postmilita kunveno de litovaj Esperantistoj en Kaunas, pri Esperanto-kurso en la ĉefurbo Vilnius, ktp. El la malferma parolado de 71-jara profesoro dum tiu kunveno estas cititaj la jenaj frazoj: *"D-ro Zamenhof ligis la ideon de internacia lingvo kun la ideo de la paco. Tial ni reorganizigu, kaj uzante Esperanton por plivastigo de internacia kunlaboro kaj amikeco, ni ankoraŭ pli forte batalu por la paco, por ke la homaro povu pli trankvile vivi kaj labori."* La raporto finiĝas per sciigo, ke la organo de la centra komitato de la organizo *Litova Komunista Junularo* aperigis leteron kontraŭ milito kaj por paco de japana Esperantisto A. G.

En la sama numero, paĝo 48. Tutpaĝa raporto, *Nova Etapo de la Ĉina Esperanto-Movado.* Tre detala raporto pri aktiveco kaj sukcesoj dum la lastaj du jaroj, de post reviviĝo de la Ĉina Esperanto-Ligo. Kun speciala kontentigo estas menciita reapero de la revuo *"El Popola Ĉinio"* kaj la intereso, kiun ĝi trovas en ĉiuj Esperantistaj rondoj. La raporto finiĝas: *"Kun subteno de Esperantistoj de la tuta mondo la Esperanto-movado en Ĉinujo certe prosperos. Ĝi ludos gravan rolon en la akcelo de interkompreno kaj amikeco inter la ĉina popolo kaj popoloj de aliaj landoj kaj en propagando de la ideo pri la paca kunekzisto inter diferencaj sociaj sistemoj, kio ja estas plej certa vojo garantii la mondpacon."*

Majo 1958, Junulara Paĝo. (Vidu supre sub januaro 1958.) *"La Junularo de la Mondo"*, organo de Tutmonda Federacio de la Demokrata Junularo, Budapeŝto, adreso... aperigis denove artikolon pri Esperanto. La novaĵo finiĝas per alvoko al la junularo: *"Montru al la redakcio kaj al la Federacio la utilecon de Esperanto por internaciaj rilatoj de la junularo. De tiuj instancoj multe dependas, ĉu Esperanto estos uzata pli grandskale dum la 7-a Internacia Junulara Festivalo."*

En la sama numero (paĝo 90): *"Kun granda plezuro ni bonvenigas tri novajn gazetojn."* 1. *"Armena Esperantisto"* aperas sub aŭspicio de la ŝtata universitato en Ereven, Sovetio, adreso... por interesuloj. 2. *"Esperanto"*, bulteno de la Iniciat-Komitato por Esperanto en Rumana Popol-Respubliko, Bukaresto, adreso... 3. *"La Verda Vojo"*, monata revuo por propagando de Esperanto, en pola kaj Esperanta lingvoj, Varsovio, adreso... Ĉiuj Esperantistoj estas petataj kunlabori per kontribuo de diversspecaj artikoloj. (Tio aspektas preskaŭ kiel preslibereco, sed tiel "danĝere" ankoraŭ ne estas.) Similajn invitojn al kunlaboro mi vidis en ĉiuj gazetoj aperantaj en la

komunistaj landoj. La redakcioj konas siajn Esperanto-naivulojn tro bone por timi, ke povos eniri ĝenantaj artikoloj. La kunlaborantoj estas aŭ komunistoj, resp. simpatiantoj, aŭ *ordinaraj, tipaj* Esperantistoj, t. e. konfesantoj de Esperantismo. La lastaj estas tre bonvenaj por tiuj redakcioj, ĉar oni povas pli bone paradi kun *neŭtralaj* artikoloj. Iun kontraŭagon oni ne anticipas, ĉar kiu intencas naĝi kontraŭ la fluan rezigne diras al si mem, ke tio estas tute senutila, ĉar esprimo de alia opinio ĉiuokaze iros en la paperkorbon, kiel tion diris al mi antaŭ nelonge iu juna Esperantisto.

Junio 1958. Sub mallongaj novaĵoj: "*Nuntempa Bulgario*" daŭrigos en 1958 sian aperadon en la sama plaĉa formo, kun bonega enhavo, riĉa materialo pri kulturo, arto kaj ekonomio de la bulgara popolo. Abono..." Estas 'forta tabako' nomi kiel bonega la enhavon de la bulgara revuo, kiu fakte sveliĝas de masiva kaj ruza komunista propagando.

Per tio povas esti fermita la *specimen-parado* el "*Esperanto*." Mi menciis nur etan parton de novaĵoj kaj artikoloj, kiuj devas esti markitaj per ruĝa krajono. Malgrandaj notoj laŭ formo kaj amplekso, kiel tiuj ekz. *Nord-Vietnamo, Aprilo 1957; Lerneja Sportkonkurso, Februaro 1958; "Nuntempa Bulgario", Junio 1958;* ktp. troviĝas en granda kvanto en ĉiu numero. En tiuj ok numeroj estas pli ol sepdek da ili.

Kontraŭ la multnombraj tekstoj, kiuj montras evidentan simpatian por komunismo oni ne povas kunmeti eĉ dek frazojn, kiuj povas esti konsiderataj kiel rekono de valorajo, kiu havas ian esencan signifon por la libera Okcidento. Eĉ raporto pri la Maria-preĝejo en Krakovo de Veit Stoss havas sian lokon en komunista propagando: Ĝi devas kredi pri la zorgo pri kulturo flanke de la komunisto sistema. Edife aŭdiĝas la konfeso de homaj rajtoj en "*Esperanto*." Tamen oni demandas sin, kiel povas akordiĝi tiuj "fundamentaj principoj" kun intensa subtenado de la soveta pac-blufado. Sed ni ne volas esti unuflanka, kaj kun aprobo ni mencias alvokon de la "Instituto de Studado kaj Agado pri Mizerio en la Mondo," kaj ankaŭ raportadon pri religiaj (sed politike sendanĝeraj) okazintaĵoj kaj literaturo. Alvoko favore al helpo por Hungarujo, kiu venas el Hungarujo, estus travidebla eĉ se la verkinto ne perfidus sin per insida konsilo: *Kiam la hungaraj Esperantistoj turnas sin rekte al eksterlandaj organizoj petante helpon, la organizoj devas informi ilin, ke la komitato en Budapesto mem esploras kaj prizorgas bone motivitajn petojn!* Ankaŭ, verŝajne bonintencata alvoko de la aŭstria ĉefdelegito de UEA favore al hungaraj rifuĝintoj malkaŝas la klimaton en la domo. La sanga sufoko de la hungara revolucio estas indulge malgrandigita kiel "katastrofo," por ke la veraj kulpantoj ne estu nomataj.

Nun al "*Heroldo*" – Sub lupeo ĝi montras la jenan bildon:

Numero de 1-a de Februaro 1958: "La paradizo aŭ la morto." Alvoko de la komitato "Albert Schweitzer kontraŭ atombomb-eksperimentoj", Groningen, Nederlando, por kolekte de subskriboj. Laŭvorte: "Per Esperanto la pet-skribo nun okazas internacie. La komitato jam ricevis listojn kun subskriboj el sekvantaj landoj... El Ĉekoslovakujo estas miloj."

Numero de la 16-a de Februaro 1958: Inter la anoncoj estas ankaŭ unu el Bukaresto, en kiu ĉiuj Esperantistoj estas petataj sendi diversspecan materialon, kiel infandeseĝnaĵojn, skribaĵojn, ankaŭ ne en Esperanto, por porpaca ekspozicio okaze de la Internacia Tago de la Virino en Bukaresto.

Numero de la 1-a de Marto 1958: Anonco: La Esperanto-Grupo de tramistoj en Budapesto, adreso..., aranĝas en la tramista kulturdomo packunvenon. Esperantistoj estas petataj sendi leterojn kiuj esprimas pacdezirojn.

Numero de la 16-a de Marto 1958: "Ĉe la Esperantistoj en Sovetio." I.a. rememoro pri la neforgesebla renkontiĝo de Esperantistoj dum la Festivalo en Moskvo. Sciigo, ke la leningrada literatura gazeto "*Neva*" atentigis pri la rolo de Esperanto en la batalo por la paco, ktp.

Numero de la 5-a de Aprilo: La redakcio de "*Heroldo*" skribas, ke certe

interesos la legantojn, ke tiun artikolon ("Ĉe la Esperantistoj en Sovetio", vidu sub 16-a de marto) ĝi ricevis pere de la gazet-servo de la soveta ambasado en Hago. — En alia loko de la sama numero: "La Bulgara Esperanto-Asocio ricevis por la jaro 1958 ŝtatan subvencio de 98,000 levoj. Laŭ oficiala kurzo tio estas pli ol 14,000 dolaroj." (La gazeto, kiu estas parte financata de tio, estas de la "neŭtrala" flanko nomata politike neŭtrala, kaj estas plej varme rekomendata al Esperantistoj en la Okcidento por abono!)

Numero de la 1-a de Majo 1958: Anonco: "La Esperanto-Klubo en Znojmo (ĈSR) organizas internacian ekspozicion de infandeseĝnaĵoj, kun konkurso de verkoj pri la temo 'Pac batalo inter la nacioj'. Kontribuojn oni sendu al" (Rafinita ruza provo jungi ankaŭ la infanojn de la Okcidento al la komunista pacveturilo!)

Numero de la 16-a de Majo 1958: Atentigo pri la venonta kongreso de bulgaraj Esperantistoj en Varna, kaj sciigo, ke la plej granda junulargazeto de Bulgarujo "Narodna Mladeŝ", kiu aperas en eldonkvanto de 200,000, serĉas en eksterlando kunlaborantojn en Esperanto. La ŝtata entrepreno "Balkanturist" eldonis jam tutan vicon da prospektoj en Esperanto.

Numero de 1-a de Junio 1958: "Timo aŭ Amikeco?" En ekspozicio "Hobbies" de la Rotary-klubo en Burnley (Anglujo) la Esperanto-grupo havis plej belan standon. Bildo prezentis terglobon kaj ĉirkaŭ ĝi man-en-mane infanoj de la tuta mondo kun naciaj flagoj sur dorso. En la fono leviĝis agarikforma nuboj de atombombo. — En la sama numero sub recenzoj: "Haltigu la atombomb-ekspodojn! Ruĝa glumarko kun kapo de terurita virino. Eldonnumero 200,000 kun Esperanto-teksto (!) kaj 20,000 kun ĉeka teksto. 100 pecoj kostas 14 kronojn. Haveblaj de ... Pilsen, ĈSR. Ciu samideano havigu al si minimume 100 ekz. de tiu tre efika glumarko. La Esperanto-teksto estas facile komprenebla al multaj nacioj en Eŭropo kaj aliaj kontinentoj."

Numero de la 16-a de Junio: "La Junulara Sekcio de Bulgara Esperantista Asocio fondis Esperanto-Festival-Grupon. Ĝi zorgas pri la oficiala enkonduko de Esperanto en la estontaj internaciaj festivaloj de la junularo kaj studentoj, pri eldono de festivala materialo en Esperanto kaj de la bulteno 'Esperanto en la Festivalo.'" — En la sama numero sub recenzoj: "Publikajo de Esperanto-Societo 'Vekigo', Kolarovgrad, Bulgarujo, sub la titolo 'Alvoko al Esperantistoj el la tuta mondo por partopreno en la agado de la pacbatalantoj.'" La redaktoro de "Heroldo" aldonas: "Sed ĉu nur 'pluraj' homoj sojfas la pacon, kiel ni legas en la alvoko? Sendube estas multaj, multegaj milionoj, centoj da milionoj!" (La redaktoro de ĉi tiu super-neŭtrala gazeto do volas, ke tiu alvoko estu akceptita serioze, kaj identigas sin kun la tuta perfida pac-blufo.)

Esperanto troviĝas en stranga "kaj... kaj" situacio en la soveta zono de Germanujo. Unuflanke ĝi ankoraŭ ne estas permesita, pro malpermesita ordono de Himmler-Bormann 1936. (La dekreto de brunaj bolŝevistoj estis de la ruĝaj ne nur ne nuligita, sed eĉ plu aplikata. Ĝi ne estas la sola!) Aliflanke la partio interesiĝas pri Esperanto por la pac-agado. En la numero de 16-a de majo 1958 estas menciita alvoko kontraŭ atom-armilo de la komisiono "Internacia Korespondo" de la pakkonsilantaro en Radebeul, DDR. Pri Esperantista renkontiĝo en Lausitz, DDR, en raporto presita en la numero de 16-a de junio 1958 estas klare dirite, ke la organizo oficiale ja ne estas permesita, tamen okazas regulaj kunvenoj, dum kiuj oni plenigis "liston kun subskriboj kontraŭ atombombo" kaj vendis "glumarkojn kontraŭ atommorto".

Per tio mi ankaŭ prezentis la strangan "heroldon", kiu supozeble havas sufiĉe multe da abonantoj inter sviasaj Esperantistoj. Bedaŭrinde mi ne povis trovi ion ajn, kion mi kun pura konscienco povus marki per verda krajono. La granda parto de la gazeto restis ja blanka, sed multaj ruĝaj markoj (de kiuj mi denove citis nur fragmenton) faras eĉ pli ne-neŭtralan impreson.

Kio estas dirita pri la du plej grandaj Esperanto-gazetoj validas ankaŭ

por ĉiuj "okcidentaj" ĝenerale. Kun evidenta aprobo de la abonantoj, la redaktoroj klopodas "forigi ĉiun politikon" kaj "observi plej rigoran neŭtralecon."

Pri la signifo de la vorto "politiko", regas la sama konfuzo inter Esperantistoj same kiel inter ĉiuj aprobantoj de "nepolitikaj kontaktoj".

"Libera Interŝanĝo de Opinio"

En la nomo de "Esperantista neŭtraleco" oni estas por libera interŝanĝo de opinio. Praktike tio signifas, ke oni povas (kompreneble malantaŭ la fera kurteno) ataki kaj kritiki ĉion okcidentan, ("finfine oni rajtas esprimi sian opinion"). En la nomo de tiu principo oni ne volas malhelpi al esperantaj gazetoj el komunistaj landoj agi ĉe ni por *iliaj celoj*. Sed la logiko tuj finiĝas kiam temas pri la sama rajto kritiki la komunistan sistemon aŭ iliajn agojn aŭ eĉ mencii pri la supereco de la okcidentaj ideoj, kaj tion oni faras denove en la nomo de neŭtraleco kaj neenmiksiĝo. Oni tuj havas pretan pretekston, ke oni ne volas havi ian ajn rilaton kun politiko. "Politiko" estas ĉio, kio servas al defendo de nia libereco. Tio, kion komunistoj skribas por disvastigo de siaj ideoj, strange, ne estas politiko.

Laŭ tiu mallogika vidpunkto la "okcidentaj" gazetoj estas skribataj tiamaniere, por ke ili ne frapu malagrabla la cenzuriston ĉe la kurteno, sed se eble eĉ trovu lian aprobon. Memkompreneble, ke oni rezignas preparoli ekz. la okcidentan sistemon de pluraj partioj aŭ liberan sekretan voĉdonadon. Tio ja estus "politiko", kaj krom tio, tiaj artikoloj, ĉar deklaritaj por-okcidentaj, estus do kontraŭ-komunistaj kaj pro tio malpermesablaj, kaj oni ja estas "neŭtrala". Tamen oni ne nur mem havas tre tolereman plumon, sed bonvoleme donas lokon je dispono de komunista agitado, permesante uzi sin kiel parol-tubon, kaj eĉ mem trumpetante tra tiu tubo. Kiam la orientaj gazetoj faras grandan bruon pri la Rapacki-plano, oni trovas en tio nenion malbonan. Kial do tio ne estas politiko, kaj kial neŭtraleco ĉi tie montras renversitan bildon, estas ne-eltroveble.

Oni Faras "Kvazaŭ"

Tio eĉ donas impreson, ke oni faras tion ne nur "pro la komuna pacidealo" aŭ "en la intereso de la nombra kresko" aŭ "pro ebleco de pli bonaj kontaktoj", sed "kvazaŭ" oni ignoras entute la vivgravajn diferencojn por la liberaj popoloj. *Tio aspektas eĉ pli kvazaŭ oni entute ne postulas iun rekompencan, ĉar oni ne havas bezonon diri ion kontraŭan, kaj la unidirektan trafikon oni trovas tute en ordo.*

Dependas de la Tono

Kontraŭ nura informado pri la disvastigo de la lingvo ankaŭ en komunistaj landoj oni memkompreneble ne argumentus. "C'est le ton qui fait la musique." (Estas la tono kiu faras la muzikon.) Estas diferenco ĉu la organo de la movado sciigas, ke okaze de la Moskva Festivalo ankaŭ Esperanto estis uzata, aŭ ĉu estas sciigite, ke la junlara sekcio de la movado partoprenis en la Festivalo kun oficiala delegitaro, kaj ke la celoj de la Festivalo ("paco", "kunekzisto", ktp.) estas identaj kun tiuj de la Esperantomovado. Por uzi komparon: Ni supozu, ke aranĝantoj de hispanaj taŭro-ludoj uzus ankaŭ Esperanton por reklamado. Kvankam la plej granda parto de la Esperantistoj abomenas tiujn ludojn, tamen ili estus informitaj pri tiu nova apliko de la lingvo. Sed se tiu informo estus en tono, kiu signifus agnoskon kaj aprobon de taŭro-bataloj, tio eksplodigus uraganon de indigno.

Rezigno pri Reciprokeco

Ĉio ĝis nun dirita rilatas al la gazetoj aperantaj en la Okcidento. Ne devas mirigi nin, ke neniu eĉ pensas pretendi al iu reciprokeco flanke de gazetoj aperantaj en komunistaj landoj, ekz. postuli artikolon en "Nuntempa Bulgario" pri sekreta voĉdonado aŭ rajto al striko en la Okcidento.

La Esperantistoj en la Okcidento, kiuj "fakte estas kontraŭ komunismo", ne montras alian sintenon. Ilia argumento estas se eble eĉ pli mallogika. Ankaŭ ili estas por zorgeme mildigita kaj "neekstrema" enhavo de la Esper-

anto-gazetoj. Ili diras, ke nur tiamaniere estos eble sendi gazetojn tra komunista cenzuro, kaj fine — tio estas ilia favorata argumento — ĉiam pli kaj pli da liberecaj ideoj trapenetros la feran kurtenon ("eĉ guto malgranda konstante frapante"). Per aliaj vortoj: La gazetoj efektive devas, por esti alisitaj en la komunistajn landojn, enhavi neniajn okcidentajn ideojn, sed tamen ili devas plenumi sian celon, helpi sendi tien la okcidentajn ideojn!

La Okcidento Pagas la Kostojn

Al tiuj, kiuj "ja estas kontraŭ la komunismo", sed tamen aklamas tiun strangan "ne-politikan neŭtralecon", apartenas precipe la katolikaj kaj protestantaj Esperanto-gazetoj. Ili ŝajne esperas, ke per siaj pure "desinfektitaj" religiaj gazetoj ili povos influi la komunistajn parti-gvidantojn al favora sinteno rilate al religio. Ekz: En la gazeto "*Espero Katolika*" por septembro 1958, oni faras riverencon al la "Statestro kaj marŝalo" Tito. Temas pri kortuŝa historio: Delegacio de jugoslavaj Esperantistoj diris al li, ke la Esperanto-Instituto en Beograd ĉiam tradukas la leterojn de eksterlandaj Esperantistoj, adresitajn al "Marŝalo Tito." La marŝalo demandis sian sekretarion, kial li sendas tiujn leterojn al la Instituto por traduko, kaj diris, ke li ne faru tion estonte, ĉar "mi deziras legi ilin en Esperanto." (Oni diras ke kamarado Josip Broz vere komprenas Esperanton. Laŭdire li lernis ĝin en malliberejo.) Ĉe la fino oni atentigas pri la belega (!) verko "Jugoslavio kaj Ĝiaj Popoloj", kiu estas havebla ĉe la katolika (!) organizo. — En la katolika Esperanto-gazeto por la junularo oni atentigas pri la komunista propaganda gazeto "*Nuntempa Bulgario*", kiun oni priskribas kiel "la plej bela". Male, oni preskaŭ ne povas atendi artikolon pri la papa encikliko "Kontraŭ la ateista komunismo."

Tiel longe kiel ne ekzistas ebleco — kaj komunista reĝimo neniam permesos tian eblecon — alporti al la Oriento demokratiajn ideojn, la Okcidento pagas la kostojn de Esperanto-paroloj kun la Oriento. La kostojn ne nur materiajn, sed antaŭ ĉio ideologiajn, ĉar la komunismo scias kiel disvastigi sian influon en la libera mondo sur la dorso de la Esperanto-movado.

DEKLARO DE LA SVISA ESPERANTO-SOCIETO

(Responde al la artikolo en "Bulletin des NIZ")

La membroj de la Svisa Esperanto-Societo, kiuj legis la artikolon "La Komunista Enfiltrado en la Esperanto-Movadon" unuanime esprimis malplaĉon pro tiu publikigo kaj petis nin preni sintenon al tio. Unue ni volas konstati, ke la Universala Esperanto-Asocio, la tegment-organizo de naciaj Esperanto-organizoj, al kiuj ankaŭ la svisa Esperanto-movado sin enkalkulas, laŭstatute estas politike neŭtrala. Kiel svisoj ni donis ĉiam al tiu paragrafo specialan atenton, kaj formale deklaras ĉi tie, ke UEA depost sia fondiĝo en la jaro 1908 neniam dekliniĝis de tiu principo. La aserto, ke la ĝenerala sekretario de UEA, D-ro Ivo Lapenna estas komunisto, ne akordiĝas kun la vero. Ĉiu, kiu konas liajn verkojn povas tion konstati; sed sufiĉas se oni rememoras, ke D-ro Lapenna en la jaro 1949 forlasis sian jugoslavanan patrujon kaj depost tiam vivas en okcidenta Eŭropo en ekzilo. La redaktoro de "*Heroldo*" s-ro Teo Jung tute integra personeco, estas ankaŭ ekster ĉiu suspekto havi por-komunistajn simpatiojn; ankaŭ ĉi tie sufiĉas mencii la fakton, ke orient-eŭropaj landoj ne donas devizaĵojn por abono de tiu gazeto, kaj ke senpagaj ekzempleroj senditaj orienten ofte ne atingas sian destin-adreson.

Antaŭ ĉio oni devas memori, ke la lingvo Esperanto laŭ formala deklaro estas nenies propaĵo, kaj konsekvence neniu estas respondeca pri tio, se iu uzas ĝin por siaj celoj. Estis iu tempo kiam en komunistaj landoj ĝi estis tute subpremita, kaj hodiaŭ ĝi estas de unuj satelitoj subtenata, de aliaj ĝi estas kiel antaŭe malhelpata en progreso. Tiuj Esperantistoj en orientaj landoj, kiuj serĉas kontakton kun la Okcidento estas ofte tute ne komunistoj, sed havas tutmondajn interesojn, kaj ili uzas la internacian lingvon por plilarĝigo de sia horizonto. Ne estas en la intereso de la libera mondo, se ĝi mem nur pro la sola timo de infiltrado, starigus siaflanke feran kurtenon. Kontraŭe, estas pli bone flegi tiajn kontaktojn, do sendi pere de Esperanto okcidentajn ideojn al orienta Eŭropo kaj Ĉinujo.

Fari riproĉon al unuopaj Esperantistoj aŭ al sendependaj Esperanto-gazetoj, ĉar ili ne persistas en absoluta "njet-sinteno" kontraŭ la Esperantistoj en orienta

Eŭropo, estas tute sensece, tiel longe kiel aŭtoritataj internaciaj organizoj kiel UN, Unesco, Tutmonda Sanec-Organizo, Ruĝa Kruco, la katolika kaj aliaj eklezioj ne rifuzos haltigi sian aktivecon ĉe la fera kurteno. En tiu konekso oni devas pritrakti la argumentadon de la anonima aŭtoro de la artikolo en "Bulletin", kaj oni devas tuj rimarki, ke ĝi eliras el principe falsa perspektivo kaj pro tio pafis tute preter la celon. — *La Estraro de la Svisa Esperanto-Societo.*

LA "BULLETIN" RESPONDAS AL LA "DEKLARO"

Ni represis la akran proteston de la Svisa Esperanto-Societo, por ke niaj legantoj povu mem fari juĝon. La respondo ne estas malfacila, sed la defendo preterpafis la celon. Oni ne povas apogi sin sur statuto de la asocio por pravigi kontraŭ-statutan konduton. Stalin foje diris: "Vortoj havas nenian rilaton kun agoj... Vortoj estas unu afero, agoj io alia. Belaj vortoj estas nur masko, malantaŭ kiu kaŝas sin malbonaj agoj."

Estus pli klarige, se la Svisa Esperanto-Societo esprimus sin rilate al citaĵoj el "Esperanto" kaj "Heroldo". Ĉu ili estis falsitaj? Falsaĵojn oni povas pruvi. La pruvo mankas. Tial la citaĵoj kaj kun tio la akuzoj estas pravigitaj.

Ni nenie skribis: "Lapenna estas komunisto." Ni plurfoje konstatis, ke li kiel ĝenerala sekretario de la organizo toleras — milde dirante — ke ties oficiala organo faras propagandon por komunista junular-festivalo, kaj ke junul-sekcioj oficiale partoprenas en la festivalo.

La ĝenerala sekretario estas rifuĝinto el la Oriento. Ni demandas: Ĉu ekzistis iu nazi-rifuĝinto, kiu de elstara pozicio en iu internacia organo tamburus por olimpiaj ludoj en tiutempa Berlino kaj advokus eksterlandajn organizojn al partopreno?

Sub "rifuĝinto el la Oriento" ni komprenas ion tute alian. Kiu devis forkuri de komunistoj zorgas precipe klare distanciĝi de komunismo. Ĉu ankaŭ Lapenna? Se oni volus fari eksperimenton kaj nomus lin faŝisto, li laŭte protestus kriante: "Mi ne estas kaj neniam estis faŝisto!" Li ja preterlasas nenium okazon por senhavigi faŝistojn (ne priatentante la postulatan "neŭtralecon" de la statuto, kiu ŝajne ne ekskluzivas la kunlaboron kun komunistoj, do laŭkonsekvence li devus ludi ankaŭ kun faŝistoj!) Tia rekta kaj klara sinteno estas laŭdinda. Nur, ke la simile sinceran neadon pri komunismo ĝis nun neniu aŭdis de lia buŝo. Kontraŭe, la komunistoj havas ĉiun grundon observadi kun kontento la agadon de la ĝenerala sekretario.

Kompreneble, ke oni ne povas malhelpi al komunistoj uzi la lingvon Esperanto. Tamen io tute alia estas, se la komunistoj sukcesis enfiltri la Esperanto-movadon — por diri la minimumon, kion oni povas diri pri tio. La faktoj donas nur du eblecojn: aŭ enfiltrado aŭ tendenco. Oni ne argumentu per preteksto, ke la okcidentaj Esperanto-gazetoj portas al komunistaj landoj demokratiajn ideojn. Kio trafas la Orienton, estas nur okcidenta papero. Do, "papero" kontraŭ "politiko"! La bilanco fermiĝas kun deficitito por la Okcidento.

Des pli naiva estas la aserto, ke estas la Okcidento, kiu pro timo konstruas feran kurtenon kontraŭ la Oriento. Neniu havas ion ajn kontraŭ la personaj kontaktoj, kontraŭ miloj da leteroj interŝanĝataj ĉiutage inter la Okcidento kaj la Oriento. Io alia estas la komerco: "Komunista propagando kontraŭ senpaga okcidenta papero", negoco, en kiu la okcidenta kunulo povas nur perdi.

Estas tre facile por respondecaj gvidantoj de la internacia Esperanto-movado liberiĝi de ĉiu suspekto pri enfiltrado: *Ili nur bezonas fari finon al tiu enfiltrado.*

Ĉi tiu Speciala Numero de AE estas havebla por 20¢ aŭ 2 int. respond-kuponoj.

AMERIKA ESPERANTISTO APARTE KONSIDERAS NEŬTRALECON

Komentoj de la Centra Oficejo

Pri neŭtraleco: Ŝajne estas granda konfuzo inter Esperantistoj pri la Zamenhofa principo de neŭtraleco, kaŭze de tio, ke oni ofte citas nur la unuan parton de Zamenhofa paragrafo kies dua parto enhavas la gravan signifon. Ni presas tiun paragrafon kaj substrekas la duan parton.

Zamenhof skribis: "Ĉiu privata esperantisto povas havi tiajn konvinkojn aŭ fari tiajn agojn, kiajn li volas, kaj ni ne respondas por liaj konvinkoj nek agoj, kiel li ne respondas por niaj. Li povas esti la plej granda egoisto, genta ŝovinisto, malamanto de homoj aŭ eĉ la plej malnobla krimulo, kaj se li nur uzas la lingvon Esperanto, ni ne povas malpermesi al li nomi sin esperantisto. *Sed se li volas veni al esperantista kongreso, aŭ se li volas aliĝi al ia alia institucio kiu portas la verdan standardon, tiam la afero ŝanĝiĝas. Tiam li venas en landon, kiu havas siajn apartajn leĝojn, siajn apartajn morojn kaj principojn.*"

Ke Esperanto, kiel lingvo, estas "absolute neŭtrala", estas memkompreneble. Sed la dua parto de la paragrafo, neniam citita de "neŭtraluloj", temas pri la organizita Esperanto-movado, kaj mencias diversajn specojn de uzantoj de Esperanto, por kiuj "la afero ŝanĝiĝas" kiam tiuj volas veni aŭ aliĝi al la movado. Ili "venas en landon (movadon)", kiu havas apartajn principojn ol tiuspecaj uzantoj de Esperanto, kiel ekzemple: "la plej granda egoisto" (ĉu vi ne konas iun tian inter la estroj de nia nuntempa movado?); "genta ŝovinisto" (ĉu ne tiuj kontraŭ judoj kaj negroj estas tiaj?); "malamanto de homoj" (ĉu naziistoj pro ras-batalo kaj komunistoj pro klas-batalo ne estas tiaj?); kaj "eĉ la plej malnobla krimulo" (ĉu ne estas, ke la krimoj kaj sango sur la manoj de la komunistoj — ekzemple en Hungarujo — meritas tiun kategorion, same kiel pli ordinaraj krimuloj kaj murdistoj?) Zamenhof do diris, ke uzanto de la neŭtrala lingvo Esperanto rajtas tute egale *nomi* sin Esperantisto; sed Zamenhof havis moralajn rezerveojn kontraŭ certaj specoj, (kiel ĉiu normala nobla homo havas kontraŭ "la plej malnoblaj krimuloj"), kiam ili volas eniri la Esperanto-movadon. "Tiam la afero ŝanĝiĝas."

Ĉio tio estas laŭ Zamenhof. Ni esperas, ke ni interpretis la paragrafon ĝuste kaj juste, sed se ne, ni invitas korektaĵojn de niaj legantoj. Nun pri "neŭtraleco" kiel UEA sub la regado de Lapenna aplikas ĝin (aŭ pli ĝuste NE aplikas ĝin, rilate al "Amerika Esperantisto" kaj EANA. Notinde estas, ke nia asocio EANA fondiĝis en la jaro 1905 kaj ĉiam estis kaj ankoraŭ estas la plej granda Esperanto-organizo en Nord-Ameriko. Ni estas por Zamenhofa neŭtraleco, sed ni ne akceptas neŭtralecon laŭ Lapenna, kiam li aranĝis kontraŭ ni eksigon, bojkoton, kaj skismon. Kion ni povas konkludi, kiam pro niaj kritikoj rilate al la kreskanta komunista tendenco en la movado, Lapenna (komunista partizano) reagas tiel sovaĝe kontraŭ ni, kaj helpis starigi en Usono maldekstran organizon ELNA sub la estrado de iama prezidanto de lernejo oficiale listigita kiel komunisto. (Li nun estas la redaktoro de la ELNA-organo.) Estas evidente, ke dum Lapenna tiel fervore aplikas "neŭtralecon" al komunistoj, li NE aplikas ĝin al kontraŭ-komunistoj! Nia sola "krimo" estas ja tio.

Revenante al Zamenhof, ĉu iu ajn povus imagi, ke Zamenhof aprobus eksigon, bojkoton, kaj skismon, rilate al la "Amerika Esperantisto" kaj EANA? Ĉu li aprobus tiajn agojn iuokaze? Zamenhof laŭdis nian gazeton kaj organizon, ekde la komenco de nia EANA en la jaro 1905. Sed eble "la afero ŝanĝiĝis" nuntempe en kontraŭa senco de tiu de Zamenhof, kaj nun (kiel titolo de komunisto Esperanto-libro el Ruĝa Ĉinio), "Por nova afero, nova maniero".

Kaj nun kelkajn vortojn pri la aserto, ke Lapenna "forlasis" Jugoslavion kiel "ekzilulo". La faktaj pri lia nuna prestiĝo en tiu lando, la varma aprobo de politikaj kaj ideologiaj instancoj tie, la kunlaborantaj kamaradoj (kiel Sekelj k. a.) en Jugoslavio kaj UEA, la aprobo de ruĝaj landoj malantaŭ la fera kurteno, verŝajne atestas kial li ankoraŭ fieras pri sia rolo kiel "komunista partizano". Kiam Lapenna unue eniris la Estraron de UEA, la Estraranoj de UEA diris al ni — tiama Komitato de UEA — ke ili scias ke Lapenna estas komunisto (kompreneble pro "neŭtraleco" tute akceptebla!), sed ili nur postulis, ke li ne misuzu sian komunismon en laboroj por UEA. Depost tiam, li rimarkinde progresis, eĉ al la plej alta pinto de la tutmonda Esperanto-movado. Kaj kune kun li, rimarkinde progresis la agado kaj influo de la komunista tendenco en nia movado.

Permesu al ni diri, ke neniu pli bedaŭras ol ni mem la hodiaŭan atmosferon de malamo, intrigo kaj skismo, kio eniras nian movadon. Tamen, ŝajnas al ni, ke nur per honesta pritraktado pri la ĉefa kaŭzo de tio, nia movado povos fari finon al la danĝera tendenco, kiu suspektiĝas Esperanton en la okuloj de la libera mondo.

"SAY IT IN ESPERANTO"

by G. Alan and Doris T. Connor

Tells You What to Say and How to Say it!

You'll be delighted by the ease with which you'll immediately be saying whole phrases in Esperanto. Practice ordering meals, renting rooms, driving a car, going to a doctor, going shopping, etc., by using this handy manual.

5¼ x 3½ in. for purse or pocket. Over 1000 phrases, many never before translated into Esperanto. A complete index with unique numbering system so that you find the phrase you want instantly. A quality product with strong covers and sewn back. A guide to conversation, with summary of grammar. Useful in Esperanto courses.

It is a thoughtful, useful gift for friends, too!

Those who receive it will find much interest in learning to say useful phrases in Esperanto; and will want to go on to a mastery of the interlanguage. Order them in quantity!

Price only 75¢ each, discounts to groups & dealers.

Published by Dover Publications, Inc. Order from EANA.



only
75¢

LINGUAPHONE HOME STUDY COURSES

You can learn *ESPERANTO*, or any other language listed below, by the world-renowned *Linguaphone* Ear-Eye Method. Order through the *Esperanto Book Service* for benefits to both yourself and your Esperanto Central Office. You may select:

Esperanto	Russian	Swedish	Persian
Italian	Finnish	Hebrew	Hausa
Irish	Arabic	Bengali	Spanish
Polish	Japanese	Greek	Dutch
Chinese	Latin	German	Afrikaans
Malay	French	Czech	Hindustani
English	Portuguese	Norwegian	Effik

Regular list price for *Esperanto*, complete course, is \$57.50. Most other languages are priced the same. A few higher, a few lower—dependent upon number of records and other factors. Write to *Esperanto Book Service* about any language in which you are interested. Special payments for members of EANA.

Esperanto Ass'n of N. A., 114 W. 16 St., New York 11, N. Y.